


L'esperanto

Revue de Itala Esperanto-Federacio

Rivista inviata in abbonamento agli associati FEI (vedasi p.2)
 Prezzo di un singolo numero 2 € per l'Italia 3 € per l'Estero



Poste Italiane S.p.A. - Spedizione in abbonamento postale 45%, D.L. 353/2003 (conv. in L. 27/02/2004 n.46) art. 1, comma 1, DCB ROMA



ISSN 1974-9147



9 771974 914006

14002



Tolkien kaj Esperanto

Oronzo Cilli
 pagina 3

30 jarojn da Lingvo-Studio

Daniele Binaghi
 pagina 11

Ĉiu zorgu pri sia propra spirito

Renato Corsetti
 pagina 14

Borse di studio Congresso 2014

Segreteria FEI
 pagina 19

Contributi per l'informazione

Segreteria FEI
 pagina 21

Nova Sento

Samanta Chittolina
 pagina 21

**All'interno inserto con la prima parte del catalogo dei libri
 in vendita presso la FEI**

ENKONDUKO

Il Consiglio Direttivo della FEI ha deciso di ripetere l'iniziativa di contribuire alla realizzazione da parte dei gruppi di attività informative rivolte al pubblico esterno, che ha riscosso gli scorsi anni un notevole successo.

Da parte sua la FEI provvederà:

- a produrre materiale informativo, vario ed aggiornato, che verrà reso disponibile per l'informazione gratuitamente o a costi simbolici;
- a realizzare materiale adatto ad arredare i chioschi informativi (striscioni, rotoli da esposizione, manifesti, ecc.) che verranno organizzati in occasione di fiere, mostre o manifestazioni varie di qualsiasi tipo;
- al finanziamento della stampa di opere ritenute necessarie alla diffusione dell'esperanto.

In sostanza, voi proponete alla FEI una attività informativa da fare nella vostra città secondo le modalità riportate nell'allegato regolamento. La FEI, constatata la congruenza dell'iniziativa alle finalità richieste, provvederà al suo finanziamento secondo le modalità previste nel regolamento.

In questo spirito la FEI suggerisce alcuni tipi di eventi auspicati:

- Trasmissioni televisive su TV locali.
 - Presenza a manifestazioni locali con un tavolo informativo, volantaggio, ecc.
 - Organizzazione di un evento culturale attinente all'esperanto, quali uno spettacolo teatrale o il concerto di gruppo musicale, purché diretti al pubblico non esperantista.
 - Campagna di annunci su giornali cittadini o di affissione di manifesti per informare su corsi di esperanto o su conferenze sull'esperanto o altro evento.
 - Conferenze su argomenti attinenti l'esperanto.
 - Altre iniziative congruenti con la vostra realtà locale purché attinenti all'esperanto e rivolte al pubblico non esperantista.
- La FEI è a disposizione per valutare i vostri progetti, che debbono pervenire al più presto, per poter essere realizzati entro il 2014. Spedire le richieste a fei@esperanto.it

**RICORDIAMO CHE ANCHE NELLA PROSSIMA
DICHIARAZIONE DEI REDDITI È POSSIBILE
FIRMARE PER IL 5X1000 ALLA FEI, INDICANDO
IL CODICE FISCALE DELLA FEI
80095770014**

Direttore Responsabile e Redattore
Leĝe Respondeca Direktoro kaj
Redaktoro:
Pier Luigi CINQUANTINI
via Dante Alighieri, 2, I-01010 Blera
tel.0761 479 503 - revuo@esperanto.it

Amministrazione - Administrejo:
FEI - Via Villorosi, 38 - I 20143 Milano
tel.02 5810 0857 - fax 02 3674 0711
fei@esperanto.it -
http://www.esperanto.it
C.F.80095770014

C. C. Postali - Poŝtkontoj:
C.C. postale FEI: n.37312204
IBAN: IT940076010160000037312204
BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX
C. C. postale FEI libri (per l'acquisto di
libri): n.54614524
IBAN: IT11K076010160000054614524

C. C. Bancario - Bankkonto:
Banca Intesa - S.Paolo, Ag.002 Milano
IBAN: IT76Q030690944510000007981
BIC/SWIFT: BCITITMM
C. C. Bancario FEI libri
IBAN: IT46H030690944510000009328
Conto UEA - UEA-Konto: iefap

Comitato Esecutivo FEI - IEF-Plenuma
Komitato:
Aldo GRASSINI, presidente
Renato CORSETTI, vicepresidente
Laura BRAZZABENI, segretario generale
Francesco MAURELLI, cassiere
Federico GOBBO
Brunetto CASINI
Michael Boris MANDIROLA

Pubblicazione riservata agli Associati.
Quote associative 2012 (comprehensive di
€ 10 dell'abbonamento alla rivista, per
tutti gli associati tranne gli Associati
Familiari)
Associato ordinario € 28,00
Associato sostenitore € 84,00
Associato garante € 280,00
Associato fino a 25 anni € 14,00
Associato familiare € 14,00
Iscrizioni presso i gruppi locali oppure
direttamente presso l'amministrazione
FEI.

La Gioventù Esperantista Italiana (IEJ) è
la sezione giovanile della FEI e ne fanno
parte gli Associati fino all'età di 30 anni.
La IEJ cura la redazione della rubrica
"Nova Sento" che compare in questa
rivista.

Registrazione al Tribunale di Milano n.85
del 27 febbraio 1970.
Stampa: Tipografia Agnesotti - Str.
Tuscanese km 1,700 - 01100 Viterbo -
Tel.0761 251 025
Progetto grafico - Grafika ideo
Federica Ursig - Davide Amadei

In copertina: Tolkien kaj la Hobito, en
la Esperanta eldono

HISTORIO

Tolkien kaj Esperanto

Oronzo Cilli*
Trad. Luigi Fraccaroli

Ĝis nun la ligilo inter Tolkien kaj Esperanto estis eltiraĵo de letero publikigita maje 1932 en la revuo «The British Esperantist». Fakte, la mirinda monata gazeto de Brita E-Asocio kaŝas almenaŭ du pliajn informojn utiligeblajn por rekonstrui la rilaton inter la onta aŭtoro de La Hobito kaj de La Mastro de l' Ringoj kaj la Internacia Lingvo kreita de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Ĉi tie montriĝas la rezultoj de esploro kondukita ĉe la brita esperanta revuo, kiu malkaŝis du epizodojn je kiuj kuntreniĝis rekte J.R.R. Tolkien: la 24a Brita E-Kongreso aprile 1933 kaj la apelacio "La eduka valoro de Esperanto" subskribita de dudek anglaj elstaruloj maje en la sama jaro kaj inter tiuj...

1930 – Oksfordo kaj la Universala Kongreso

En 1930, la sidejo elektita por gastigi la 22an UK-n estas la universitata urbo Oksfordo¹, kie Tolkien vivas kaj instruas, kaj kie la 23an de januaro de la sama jaro fondiĝis la tiea E-grupo. La elektita epoko estas la semajno



2-9a de aŭgusto, kaj ĝuste januare de tiu jaro – kiel skribas la monata gazeto «International Language» en la marta numero – la «Oksforda Universitato sekvis la ekzemplon. La 23an de januaro la Oksforda Universitata Esperanto-Societo fondiĝis kun klaso de dek kvin studentoj el pluraj kolegioj. La Societo ricevis oficialan agnoskon de la universitataj instancoj»².

La Universalan Kongreson prezidas Bernard Long, *Bachelor of Arts* kaj estrarano de B.E.A. kaj kiel viculo W.E. Collinson, profesoro pri la germana lingvo kaj *Buchanan Lecturer* de Esperanto ĉe la Liverpula Universitato.

La programo de la kongresa semajno antaŭvidas, por la posttagmezo de sabato la 2an de

aŭgusto, la sesion de la Internacia Centra Komitato, sekve la sesion de la Ĝenerala Konsilio kaj, vespere, la kongresanoj gastas ĉe la Urbestro de Oksfordo, William Stobie. Dimanĉon matene, post la Meso³, jen la momento por fotografaĵoj. La plej fama en tiu kongreso estas tiu farita al la grupo de partoprenintoj en la Kembra Kongreso en 1907⁴. Posttagmeze sesio kun libera vespero. Landon matene malfermiĝas la unua laborsesio; posttagmeze komenciĝas la Somera Universitato kun la unua leciono, la fakaj kunsidoj kaj fine la dancvespero en naciaj kostumoj. La marda mateno malfermiĝas per la UEA-kunveno kaj posttagmeze denove la Somera Universitato kaj la fakaj kunsidoj

1) Dum 1929 ĝi okazas en Budapeŝto, Hungario, kaj dum 1931 en Krakovo, Pollando.

2) Esperanto in the Universities, en «International Language», Londono, vol. VII, Marto 1930, p. 52.

3) Kontaktoj inter esperantistoj kaj Katolika Eklezio okazis dekomence. Dum 1906, la 2an de junio, Pio la 10a akceptis en aŭdienco la Roman Esperanto-Grupon fonditan de pastro Luigi Giambene, ŝerce kromnomata pastro Esperanto. La rilatoj firmiĝas post la fino de la dua postmilito kiam Pio la 12a, en 1950, salutas en Esperanto la esperantistojn kunvenintajn en komuna aŭdienco en la baziliko de S-ta Petro.

4) La bildoj publikigitaj en ĉi tiu artikolo videblas en la retejo de Österreichische Nationalbibliothek.

doj. La vespero estas dediĉita al la kunsido pri publika varbado. Merkredon matene oni komencas per la dua laborsesio; posttagmeze denove Somera Universitato kaj fakaj kunsidoj. La vesperon duono de la partoprenantoj okupiĝas per kelkaj ludoj kaj la alia duono en koncerto. La tuta ĵaŭda mateno estas dediĉita al ekskursoj. La kongresanoj povas elekti inter: a) vizito al la reĝa kastelo de Windsor, kaj vojaĝo sur la Tamizo per specifaj ŝipoj; b) aŭtomobila ekskurso al Banbury, Kenilworth, Warwick, Stratford-on-Avon kaj Broadway; c) Aŭtomobila ekskurso al Newbury, Andover, Salisbury, Stonehenge, Marlborough kaj Wantage. Fine, aŭtomobila ekskurso al Cirencester, Stroud, Gloucester, Cheltenham, Nord Leach kaj montetaro Costwold. Vespere la kongresanoj spektintaj la koncerton partoprenas en la ludoj, dum la ludintoj spektas la koncerton. La vendreda mateno malfermiĝas per la tria laborsesio kaj la vespero finiĝas per balo. Sabaton matene la kongreso fermiĝas per la lasta sesio. En la 22a Kongreso de Oksfordo partoprenas 1211 homoj el 29 malsamaj landoj. La plej grandan parton, kompreneble, kovras Anglujo kun 623 partoprenantoj sed alvenas ankaŭ ses el Aŭstralio kaj naŭ el Japanio dum el Italio estas nur ok⁵. La delegitoj ricevas ankaŭ la oficialan Pinglon, faritan okaze de la Kongreso, kvinangulforman por simboligi la kvin kontinentojn, kun interne la verda stelo. Super



Partoprenantoj en la Kongreso, de maldekstre dekstren: Prof-ro Finlay, Emilja Heruchin (nevino di L.L. Zamenhof), d-ro Gregg, Noel Baxton (Inglese MP)

la reliefa gravuraĵo de la Oksforda Universitato vidiĝas la surskribo XXIIA Universala Kongreso de Esperanto, ĉe la suba parto, kaj kun emajlita verda fono, Oxford 2-9 August 1930.



1930 – Kio pri J.R.R. Tolkien?

Ĉe la lumo de tio ĝis nun raportita, kompreneble oni sin demandas, ĉu inter la partoprenintoj estis ankaŭ prof. J.R.R. Tolkien. Nu, post konsultado de la listo de la 1211 partoprenintoj publikigita en la monata gazeto «International Language» de la numero de januaro 1930 ĝis tiu de oktobro de la sama jaro⁶ –

krom tiu de septembro – kaj prizorgita de Cecil Charles Goldsmith, sekretario de BEA, la nomo de J.R.R. Tolkien ne montriĝas.

Tio tamen ne signifas ke Tolkien ĝin ne partoprenas sed eble li partoprenis nur en kelkaj aktivaj preferoj ol en la tuta kongresa semajno. La katolika semajna revuo «The Tablet» skribas, ke «samtempe kun la Internacia Esperanto-Kongreso de Oksfordo, prediko en tiu lingvo estas farita al la katolikaj delegitoj en la domikana monaĥejo de Blackfriars, de patro Gaffney O.P. [irlandano]»⁷. Estas eble ke lia Fido, intereso pri tiu lingvo kaj, ne laste, la dominikana monaĥejo de Blackfriars, ĉeestigas lin en la diservo.

La domikana monaĥejo de Blackfriars ne estas fremda al li. Sabaton la 19a de majo 1945, Tolkien messervas ĝuste en tiu monaĥejo: tion oni ekscias el le-

5) Listo de Kongresanoj, en «International Language», Londono, vol. VII, Oktobro 1930, p. 236.

6) La listo de partoprenantoj, kiu antaŭvidas Familinomon kaj Nomon punktumitan, akademian aŭ asocian kvalifikon, personan adreson, devenurbon kaj naciecon, estas tiel dividita: January, n. 1-61; February, n. 62-126; March, n. 127-239; April, n. 240-319; May, n. 320-428; June, n. 429-521; July, n. 522-646; August, n. 647-1097; October, n. 1098-1211. In «International Language», London, vol. VII, January-October 1930.

7) Orbis Terrarum, en «The Tablet», Londono, 9a de aŭgusto 1930, p. 192.




Foto de la partoprenantoj en la UK de Cambridge

tero sendita la 15an de majo al sinjorino Michal Williams, la saman tagon de la morto de ŝia edzo Charles pro operacio. Charles Williams estis angla verkisto kaj poeto kaj historia membro de Inklings kun C.S. Lewis kaj J.R.R. Tolkien mem. Li skribas al ŝi «[...] Fratulo Gervase Mathew⁸ celebros meson sabaton je la 8a matene ĉe Blackfriars⁹, kaj mi servos; sed kompreneble Vi estos en miaj preĝoj tuj kaj por ĉiam [...]»¹⁰. Ankaŭ pri partopreno en la diservo de la 9a de aŭgusto 1930, bedaŭrinde, ni havas konfirmon en neniu eldonita volumo aŭ en leteroj de la sama angla aŭtoro. La sola certeco venas el la fakto ke Tolkien sendube konas la Kongreson, ĉar li ĝin preparolas je la komenco de Sekreta malvirto (*A Secret Vice*), en la kolekto zorgata de la

filo Christopher, La monstroj kaj la kritiko kaj alia esejo (*The Monsters and the Critics and other Essays*) – teksto en kiu Tolkien brile disertacias pri artefaritaj lingvoj kaj ilia supozita “neutileco”, ĉefe pri la speciala gusto kiun ili lasas al la elpensintoj kaj al tiuj malmultaj “inicitoj” ilin lernintaj. Kiel sciante, tamen, la teksto ne estas datita kaj la hipotezoj pri la verkojaro dispartigas inter tiuj, kiuj ĝin okazigas prefere dum 1931, pro la komencaj vortoj, kaj tiuj, kiuj subtenas ĝian verkepokon mallonge post la Kongreso de 1930 kun posta revizio por sekva prelego. Komence de sia parolado, profesoro Tolkien skribas: «Eble kelkaj el vi scias ke antaŭ unu jaro, aŭ pli, en Oksfordo okazis kunveno pri Esperanto; aŭ eble ne, vi tion tute ne scias.

Persone, mi taksas min entuziasmuldo pri «artefaritaj» lingvoj, almenaŭ por Eŭropo; tio estas, mi favoras ties internan dezirindecon kiel eblan kaj necesan antaŭkondiĉon por la unuiĝo de Eŭropo, antaŭ ol ĝin forvoros “ne-Eŭropo”, krom pro multaj aliaj bonegaj kialoj. Mi favoras ties dezirindecon ĉar, laŭ mia scio, la monda historio ŝajne montras kaj iompostioman pliiĝon de la homa kontrolo (aŭ influo) de la nekontrolblaĵo, kaj laŭgradan ekspansion de gamo de pli-malpli sensanĝaj lingvoj. Aldone, mi havas apartan preferon al Esperanto, ankaŭ ĉar temas esence pri kreaĵo de ununura homo, ne filologo, kaj sekve aspektas por mi kiel «homa lingvo sen la komplikoj ŝulditaj al la faro de troaj kuiristoj kiuj fuŝas la supon»: kaj tio estas por mi la plej bona priskribo de ideala artefarita lingvo. Sendube la esperantista propa-



8) Gervase Mathew, klaso 1905, amiko de Tolkien ekde la infanaĝo, eniras la dominikanan ordenon de Blackfriars dum 1934 kaj tie restas ĝis la jaro de sia morto, 1976.

9) En la dominikanan monaĥejon li reiros la 26an de oktobro 1966, por legi sian *Smith of Wootton Major* dum evento organizita de la Prioro de la dominikana monaĥejo, Fr-o Bede Baylei, kaj de Fr-o Hugh Maycock, Direktoro de la Religia Instituto Pusey House, lokita apud la dominikana monaĥejo kaj ĉe la sama trotuaro de la trinkejo Eagle and Child. Kiel memorigas Wayne G. Hammond kaj Christina Scull «eĉ se estis tre humida vespero, partoprenis pli 800 homoj, pli ol tiuj enteneblaj en la Refektorio kun homoj eĉ en la ekstera koridoro [Wayne Hammond; Christina Scull, *The J.R.R. Tolkien Companion e Guide*, vol. 1, *Chronology*, 2006, p. 678-79]. La evento estas citita ankaŭ en *La Forĝisto de Wootton Major* en la nova angla eldono prizorgita de Verlyn Flieger kaj italigita de Lorenzo Gammarelli presite de Bompiani.

10) Humphrey Carpenter, Christopher Tolkien, *The letters of J.R.R. Tolkien*, George Allen & Unwin, Houghton Mifflin, 1981.

gando sin apogis al tiuj konsideroj. Mi ne scius. Sed tio ne multe gravas, ĉar ne pri tiu specifa artefarita lingvo mi vin parolos ĉi-vespere»¹¹.

Pormomente, ĉar ne estas dokumentoj, ĉiuj hipotezoj restas kredeblaj kvankam la ligo inter Tolkien kaj Esperanto ne finiĝas ĉi tie.

1932 – Tolkien “esperantisto”

Se pri lia partopreno en la Kongreso de 1930 ne estas konfirmo, kvankam la verkanto pli inklinas al ĉeesto eĉ se nur partatempa, ekzistas tamen skribaĵo pri lia “engaĝiĝo” por esperanto, konata al multaj homoj. Temas pri letero de Tolkien mem sendita al la sekretario de la Eduka Komitato de Brita Esperanto-Asocio post kiam ĝi lin nomumis en la Board de Honoraj Konsilianoj. Eltiraĵo de tiu letero eldoniĝis en la numero de «The British Esperantist», de majo 1932 sub la titolo Filologo pri Esperanto¹².

Tolkien skribas, ke li montris intereson por la internacia lingvo “kiel filologo, kaj kiel ĉiu filologo devus”, rigardante ĝin “grava kaj interesa lingva fenomeno” kun kiu li sentas sin agorda.

Li skribas, ke li ne estas lerta esperantisto¹³ kiel, laŭ li, devus esti konsiliano, rilate al lia “nova” tasko. Li koncedas koni ĝin, “kiel dirus filologo”, ĉar li ĝin lernis dum 1907 – li skribas “antaŭ dudekkvin jaroj” – kaj ne forgesis ĝiajn gramatikon kaj

A PHILOLOGIST ON ESPERANTO

The latest addition to the Board of Honorary Advisers of the B.E.A. Education Committee is Prof. J. R. R. Tolkien, of Oxford. In a letter to the secretary of the Committee he writes (we quote extracts with his permission) :—

I take an interest, as a philologist, and as every philologist should, in the international-language movement, as an important and interesting linguistic phenomenon, and am sympathetic to the claims of Esperanto in particular. I am not a practical Esperantist, as it seems to me on reflection an adviser should at least in some measure

strukturon kaj, konsiderante ke siatempe li legis bonan dozon da tekstoj, li bone konas tiun specon de lingvoj kaj tiel sentas sin “kompetenta por juĝi pri bonaj kaj malbonaj kvalitoj”. Antaŭdirinte tion, tamen, siaopinie li povas doni utilan kontribuon nur kiel filologo kaj kritikisto.

Laŭ la ideo de Tolkien pri la situacio de la internacia lingvo, tiaj servoj, kiom ajn bonaj el teoria vidpunkto, praktike estas nedezirataj, kaj esti teknikisto pri filologio iĝas “baro kaj malhelpo”. Sed ĝuste pro tio, kiu laŭ li estas forta kialo, li emas subteni Esperanton.

Esperanto, daŭrigas Tolkien, ŝajnas al li sendube, ĉion sumante, supera al ĉiuj siaj konkurantoj, ĉar ĝi estas jam je la unua loko kaj atingas larĝajn kaj efektivajn aprobojn, krom tio, ke ĝi evoluis la plej progresintan organizon.

Tolkien ĝin komparas kun ortodoksa eklezio alfrontanta nekredantojn, sed ankaŭ skismulojn kaj herezulojn. Li opinias, ke tiun situacion antaŭvidis la filologo. Laŭ li, Esperanto superis la plej gravan problemon kiun devas alfronti kandidata internacia lingvo, tiu de la monda disvasti-

go, ĉar ĝi atingis “certan nepran gradon de simpleco, internacieco kaj (mi aldonus) de individueco kaj eŭfonio”. Ilo kun ebleco atingi tian celon, laŭ Tolkien, valoras cent teknike pli perfektajn. Laŭ la Oksforda filologo, en la lingvaj invento kaj gusto estas nenio definitiva kaj la beleco de la elpensado en la detaloj montriĝas relative malgrava preter la nepra minimumo, kaj teoriuloj kaj inventistoj – kaj inter tiuj, li skribas, li ĝojus eniri – nenion alian faras ol malrapidigi la movadon, “se ili pretas rezigni pri unuanimeco por plibonigo”.

Tolkien agnoskas ankaŭ ke la teknika plibonigo de la instalaĵo, celanta pli grandan simplecon kaj klarecon de la strukturo aŭ pli grandan internaciecon, inkludas detruo la “homan” aŭ estetikajn aspektojn de la inventita idiomo. Li opinias ke tiu aspekto, laŭŝajne ne tro praktika, estas rimarkinde neglektita de la teoriuloj, kvankam la profesoro pri la angla ĝin taksas tute ne flanka, kaj fine ĝi havos grandan influon sur la baza problemoj de la universala akcepto. Tolkien, ĉe la fino, citas per N**, probable Novial-on¹⁴, alia lingva pro-

11) J.R.R. Tolkien, Un vizio segreto, en *Il medioevo e il fantastico*, Bompiani, 2013, pp. 283-84.

12) J.R.R. Tolkien, A Philologist on Esperanto, en «The British Esperantist», Londono, vol. XXVIII, n. 325, Majo 1932, p. 182.

13) Fakte, Bodleian Library en Oksfordo konservas notlibreton de Tolkien, *Book of the Foxrook*, kun pluraj notoj verkitaj je aĝo 17 jaroj, kiuj montras konon kaj intereson de la filologo al esperanto rimarkinde pli grandajn ol legeblas en tiu letero.

14) Artefarita lingvo, kreita de la dana lingvisto Otto Jespersen, publikigita komence dum 1928 kun vortaro bazita sur tiu de germanaj kaj romanidaj lingvoj, gramatiko sur tiu angla kun forta influo ankaŭ de esperanto kaj Ido.

jekto, kiel talenta kaj pli simpla ol esperanto, sed taksas ĝin abomena ĉar vidas surskribon: “fabrike produktita”, aŭ, pli bone, “farita per vicpecoj”. Lingvo, projekto alternativa al Esperanto, kiu laŭ li “ne havas tiun ereton da individueco, kohero kaj beleco kiuj aperas en la grandaj naturaj lingvaĵoj, kaj ŝajnas je konsiderinda nivelo (probable la plej alta nivelo ebla por artefarita idiomo) en Esperanto – origina pruvo de la genio de la aŭtoro”.

La konkludo estas konsilo por ĉiuj, kiuj havas tempon aŭ emon okupiĝi pri la movado por la internacia lingvo: “Subtenu fidele Esperanton”.

Ĝis ĉi-tie, tio konata pri Tolkien esperantista, kion eblas pliprofundigi per la plenkompleta eseo verkita pri la temo de Arden R. Smith kaj Patrick Wynne “Tolkien and Esperanto” (Seven: An Anglo-American Literary Review, n. 17, 2000, pp. 27-46). Sed el atenta kaj profunda esploro ĉe la monata revuo de BEA, elvenas du novaj neeldonitaj novaĵoj de certa intereso por fakuloj kaj pasiaj tolkienanoj kaj esperantistoj.

1933 – Tolkien esperantisto kaj protagonisto

La esperantista agado de Tolkien ne fermiĝas en 1932: tion diras denove la gazeto «The British Esperantist» en du numeroj de 1933.

La nomon de la estonta aŭtoro de La Hobito kaj de La Mastro de l' Ringoj ni retrovas en la numero de januaro 1933, citita en la anonco de la XXIV Britia E-Kongreso, kiu okazas la saman jaron dum Paska tempo denove en la urbo Oksfordo.



En la paĝo de la esperantista gazeto legiĝas:

24th BRITISH ESPERANTO CONGRESS

Oxford—Easter, 1933.


*Patrons: H.R.H. The Duke of Connaught, K.G.; His Worship the Mayor of Oxford (Alderman G. H. Brown); Sir Michael Sadler, K.C.S.I., C.B.; Professor Braun Holtz; Councillor Rev. John Carter, Dr. A. D. Lindsay, C.B.E., Master of Balliol College, Professor J.R. Tolkien, and A. Barratt Brown, Principal of Ruskin College*¹⁵.

Efektive Tolkien aperas inter la patronoj de tiu Kongreso kune kun aliaj tiutempaj Oksfordaj

eminentuloj. La Kongreso disvolviĝas ĉe la Hotelo Randolph, en Braumont Street en Oksfordo; por tiu okazo estas aranĝitaj ankaŭ Esperanto-kursoj kiel tiu raportita de «The Tablet» la 25an de marto 1933: «Post la Brita E-Kongreso okazanta en Oksfordo dum la Paska semajno, Pastro Andreo Cseh, de la Angla Ligo de Katolikaj Esperantistoj anoncas la intencon fari mallonga instruan kurson en esperanto. Pastro Cseh estas hungaro, kies instru-sistemo akiris grandan sukceson»¹⁶.

La Kongresa programo antaŭvidas por vendredo la 14a de aprilo, je la 9a horo, malfermon de la aliĝoj, matene kaj posttagmeze promenadon tra Oksfordo kaj vespere provlecionon de esperanto.

Sabaton la 15a de aprilo, matene, estas la jarkunveno de BEA; posttagmeze renkontiĝo de instruistoj kaj aliaj interesitoj pri Esperanto kaj instruado kun temo: “La nuntempa pozicio de Esperanto en la lernejoj de Britujo”. Prelegas Montagu Chri-



Hotelo Randolph en Oksfordo

15) «The British Esperantist», London, vol. XXIX, n. 333, January 1933, p. 3.

16) Orbis Terrarum, en «The Tablet», Londono, 25a de marto 1933, p. 384.

stie Butler¹⁷, Prezidanto de BEA, prezidas Novell Smith, M.A. (jam estro de Lernejo Sherborne). Dimanĉon la 16a de aprilo, post la Diservo en la Kapelo de New College gvidata de W. Severn, foto de la Kongresanoj. Dum la posttagmezo la regiona kunsido kaj vespere koncerto. La lastan tagon, lundo la 17a de aprilo, tuttagaj ekskursoj al Kenilworth, Warwick kaj Stratford. Antaŭviditas ankaŭ ekzamenoj por la diplomoj IBEA kaj LBEA. La Kongresan sekretariejon prizorgas J.F. Brendel, 89 Dene Road, Headington en Oksfordo. Ĉiujn kongresajn vesperojn aranĝas Oksforda E-Societo. Ni ne scias ĉu Tolkien intervenas en la Kongreso, en tio la esperantista gazeto nin ne helpas, sed se ĝi tion farus, nenio malpermesus al ni hipotezi ke la utiligita teksto estis ĝuste Sekreta malvirto. Sed temas nur pri unu el multaj hipotezoj. La dua rilato al Tolkien estas, miaopinie, eble pli grava ol la noto mem publikigita dum 1932, kaj troviĝas en la numero de majo 1933, ankoraŭ en «The British Esperantist», kaj tre probable havas striktan ligon kun la Kongreso okazinta la antaŭan jaron. En la maja numero, unuapaĝe, estas teksto redaktita aprile 1933 titolita «La eduka valoro de Esperanto». Verŝajne ĝis estis verkita fine de la 24a Kongreso antaŭe aludita ĉar, dum la sabato, estis en la programo la renkontiĝo «La nuntempa pozicio de esperanto en la lernejoj de Britujo». Tio konfirmus la ĉeeston de Tolkien kaj la aktivan

THE BRITISH ESPERANTIST

WITH WHICH IS INCORPORATED

INTERNATIONAL LANGUAGE

Vol. XXIX, No. 337. May, 1933.

THE EDUCATIONAL VALUE OF ESPERANTO.

—◆—

In view of the great need, under modern conditions, for a simple yet adequate international auxiliary language, which could be learned in all

rolon dum la kongresaj laboroj. La teksto diras «konsiderante la grandan neceson, en la aktualaj kondiĉoj, de simpla sed taŭga internacia helplingvo lernebla en ĉiuj civilizitaj landoj, kaj libere uzebla skribe kaj parole en ĉiuj vivofazoj, ni volas altiri la atenton pri la meritoj de Esperanto kaj ĝia loko en la instruado».

«Tiu lingvo» ĝi daŭras «superis la ekzamenon de kvardekkvin jaroj da praktika uzo. Ĝia sukceso estis pruvita dum ne malpli ol dudekkvar Internaciaj Kongresoj, kutime partoprenataj de pli ol mil homoj, reprezentantoj de tridek aŭ kvardek naciecoj. Ne necesas interpretistoj dum tiuj kunvenoj, aŭ dum la lokaj kunsidoj de la fakuloj okazantaj kunlabore kun ili aŭ dum aliaj momentoj».

«Ne nur estas vasta kaj flua lingvouzo por vojaĝoj, kulturaj kaj personamikaj rilatoj, sed ĝiaj realigoj por teknikaj kaj profesiaj celoj estas jam rimarkindaj.» Sed ankaŭ «katedroj pri esperanto estas starigitaj ĉe la Universitatoj de Liverpulo, Ĝenevo kaj Krakovo; originlingvaj

verkoj estis eldonitaj interalie de Prof-ro Baudouin pri Mem-sugestio, de Prof-ro Bovet pri Psikanalizo, kaj de Prof-ro Collinson pri Lingvo».

Tiel ankaŭ «multaj sciencaj kaj teknikaj demandoj aperis, ĉefe en Japanio, kie verkiĝis dokumentoj kaj pritraktiĝis pluraj temoj kiel elteno de materialoj, neorganika kaj organika kemio, kaj meteorologio, kaj en la sama lando eldoniĝis farmacia vortaro en Esperanto, kaj pluraj teknikaj vortaroj estas eldonitaj en Eŭropo, inter kiuj unu el preskaŭ kvarmil terminoj eldonita de la Internacia Societo de Esperantistoj Kuracistoj. Nur dum 1931, 1204 diskutoj en Esperanto kaj 514 lecionoj estas elsenditaj el sendrataj stacioj en 21 landoj, inkluzive Japanion». La dokumento daŭrigas asertante ke «la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj havas liston de preskaŭ sep mil instruistoj (en sesdek landoj) scipovantaj la lingvon kaj pli ol mil lernejoj (en trideku landoj) kie estas starigitaj Esperanto-klasoj. Inter tiuj estas la bazaj kaj mezlernejoj en Britujo, kaj estas interese

17) Montagu Christie Butler (Londono, 25a de januaro 1884 - 5a de majo 1970) estis brita akademiano, muzikisto kaj esperantisto. Butler eniris la tiaman Ligan Komitaton (hodiaŭ Akademio de Esperanto) kaj deĵoris de 1916 ĝis 1934 kiel sekretario de Brita E-Asocio.

memorigi, ke la Board of Education por Anglujo kaj Kimrujo dum multaj jaroj konsentis vesperajn kursojn en esperanto al lernejoj prezentintaj demandon pri ĝia starigo». La subskribintoj skribas ke «ni subtenas la adopton de Esperanto kiel unuan lernolingvon, post la patro-lingvo, en la lernejoj de ĉiuj landoj, kaj pro ĝeneralaj kialoj kaj pro la jenaj specifaj motivoj».

Poste ili listigas jene:

«1. Scipovo de Esperanto povas esti akirita dum tempo eksterkulture mallonga kompare kun tiu bezonata por la naciaj lingvoj, plenaj je malfacilaĵoj gramatikaj, lingvaj, prononcaj: tiel, ĝin studi estas profita ankaŭ por tiuj lernantoj kiuj ne havas tempon aŭ kapablon por lerni fremdan lingvon sufiĉe bone por kapabli ĝin uzi.

2. Oni kontrolas la lingvan kapablon kaj helpas la instruiston pli rapide malkovri tiujn lernantojn, kiuj povas profite alfronti studon de aliaj lingvoj, por kio ĝi estas bonega enkonduko.

3. Ĝia gramatika logiko, kaj la fakto ke ĝia esprimmetodo estas klara kaj nepridubebla, strebas evoluigi zorgemon pri la vortouzo.

4. La scio de Esperanto ne nur agas kiel stimulo por lerni aliajn lingvojn, sed ankaŭ kondukas al pli efika lernado de geografio, inkluzive la intereson, akiritan pere de korespondado, por la vivo de la aliaj landoj en ĉiuj partoj de la civilizita mondo.

5. La Esperanta literaturo, ĉu originala ĉu tradukita, konstante kreskas, kaj jam nun sufiĉas por pravigi studadon de la lingvo».

La konkludo diras «ni feliĉe aliĝas al la klopodoj por enkonduki Esperanton kiel normalan instrufakon, kaj por kuraĝigi ties uzon en la lernejoj de la tuta mondo».

Sekvas la dudek aŭtoritataj subskriboj kaj la lasta, mirige, estas de: J.R.R. TOLKIEN, M.A., Rawlinson and Bosworth Professor of Anglo-Saxon¹⁸, University of Oxford.

La apelacio, ŝajne, iĝis reala manifesto: tion ni ekscias okaze de la Aŭstralia E-Kongreso de decembro 1951, okazinta en Sidnejo, dum kiu Herbert Koppel el Melburno, sekretario de AEA, al ĵurnalisto montras «presitan manifeston favoran al la lingvo, subskribitan de dudeko da anglaj verkistoj kaj fakulo, inter kiuj G.P. Gooch, la historiisto, kaj Profesoro J.R.R. Tolkien, profesoro pri la anglosaksa en Oksfordo»¹⁹.

Konkludoj

Tiu ĉi vojaĝo en la Oksfordo de la komenco de la tridekaj jaroj, inter Kongresoj kaj esperantistoj, ne estas kompreneble alvenpunkto por la rilato inter Tolkien kaj Esperanto; male, ĝin konsideru starpunkto por novaj kaj pli profundaj esploroj pri bibliografia kaj lingvistika aspekto sendube interesa.

Oni povus serĉi informojn aŭ novaĵojn pri la Oksforda Kongreso de 1933 kaj eĉ eltrovi aliajn kunligojn inter Tolkien,

kiu ŝajne partoprenis en la Oksforda Kongreso de 1933, kaj la lingvo elpensita de Zamenhof. Hodiaŭ ni scias ke la Tolkien-a intereso por tiu lingvo komenciĝas dum 1907, per paĝo de lia notlibreto *The Book of Foxrook*, nun konservata en la Bodleian Library, daŭrigas en la periodo antaŭe priskribita kaj poste transiĝas je fazo de repripensio. Tiun ĉi lastan atestas noto verkita ĝuste sur la provaĵo de la komenca paragrafo de Sekreta malvirto, aŭ pli verŝajne sur la rekontrola provaĵo. Lia filo Christopher, en noto al la teksto, skribas ke lia patro notas ne esti «plu tiom konvinkita ke [artefarita lingvo] estas bona afero», kaj daŭrigas ke «pormomente laŭ mi estus dezirinda lingvaĵo nehoma, komplete senigita je ĉiaj kuiristoj, anstataŭitaj de spertuloj pri nutra tekniko kaj profesiaj liofilizistoj»²⁰.

Post kelkaj jaroj maturiĝas la ideo ke legendoj kaj rakontoj dependas de la lingvo al kiu ili apartenas, kun rilato ankaŭ al Esperanto. Li skribis al iu leganto, s-ro Thompson, la 14an de januaro 1956:

«Ĝuste je la militeksplozo en 1914 mi malkovris ke “legendoj” dependas de la lingvo al kiu ili apartenas; sed vivanta lingvaĵo dependas egalmezure de la “legendoj” kiujn konservis tradicio. (Ekz-e, homo ne kapabla percepti ke la greka mitologio dependas multe pli de la mirinda beleco de sia lingvo kaj de la nomoj de personoj kaj lokoj ol de sia enhavo, kvankam

18) Tolkien ricevas la katedron pri anglosaksa lingvo Rawlinson kaj Bosworth – el la nomo de la du bonfarantoj Richard Rawlinson, kiu post sia morto, en 1755, donacis kapitalon por ĝin starigi, kaj Joseph Bosworth, kiu en 1858 okupis tiun oficon kaj volis aldoni ankaŭ sian nomon – dum 1925 kaj ĝin tenas ĝis 1945, jaro dum kiu li iĝas Profesoro ĉe Merton College.

19) Esperanto Enthusiasts To Hold Conference, en «The Sidney Morning Herald», 1a de januaro 1952, p. 2.

20) Christopher Tolkien, Un vizio segreto, en Il medioevo e il fantastico, Bompiani, 2013, p. 283.

memkompreneble ĝi dependas de ambaŭ. Kaj inverse, Volapük, Esperanto, Ido, Novial, ktp ktp estas mortintaj, multe pli mortintaj ol aliaj antikvaj ne plu uzataj lingvoj, ĉar iliaj aŭtoroj neniam inventis legendojn en Esperanto»²¹.

Leginte tion skribitan, eblas hipotezi ke Tolkien komencis

havi rolon, aŭ esti agnoskita kiel gvidosigno, ekde 1932, kaj ke post mallonge li "forlasis" la Esperantan komunumon por sin dediĉi al sia ĉefa pasio. Ankaŭ la apelacio de 1933 konfirmis tion. Fakte, dum 1931, la nomo de Tolkien ne aperas en alia apelacio pri Esperanto en la monda instruado apud tiuj ok eminentu-

loj subskribontoj kun li tiun de 1933 (T. Grame Bailey, C. B. Fawcett, J. J. Findlay, Alexandra Fisher, J. C. Flugel, S. Margery Fry, C. W. Kimmins kaj Nowell Smith)²². Post 1933, pri Tolkien esperantisto oni ne konas aliajn dokumentojn aŭ novaĵojn kaj tio -mi kredas- povas esti bona startpunkto...

ALDONOJ

Sekvas la subskribintoj de la apelacio de aprilo 1933

THE EDUCATIONAL VALUE OF ESPERANTO (La eduka valoro de Esperanto)

[...] We heartily associate ourselves with the efforts that are being made to introduce Esperanto as a regular subject of instruction, and to encourage its use in the schools of the world.

T. GRAHAME BAILEY, M.A. . B.D., D.Litt..
Reader in Urdu and Hindustani, University of London.

T. C. BAILLE, M.A., D.Sc.,
Principal, West Ham Municipal College.

W. E. COLLINSON, M.A., Ph.D.,
Professor of German and Buchanan Lecturer in Esperanto, University of Liverpool.

CHAS. W. COWEN, M.A.,
President, National Union Teachers, 1929.

C. B. FAWCETT, B.Litt., D.Sc.,
Professor of Economic and Regional Geography, University of London.

J. J. FINDLAY, M.A., Ph.D., M.Ed.,
Honorary Professor of Education, University of Manchester.

ALEXANDRA FISHER, M.A., D.Litt.,
Headmistress. Girls' County School, Bishop Auckland.

J. C. FLUGEL. B.A., D.Sc.,
Assistant Professor in the Dept. of Psychology, University College, London.

S. MARGERY FRY, M.A., LL.D.,
Late Principal of Somerville College, Oxford.

G. P. GOOCH, M.A., D.Litt.,
Fellow of the British Academy.

G. H. GREEN, M.A., Ph.D.,
Lecturer in Education, University College of

Wales, Aberystwyth.

T. GWYNN JONES, M.A.,
Professor of Welsh Literature, University College of Wales, Aberystwyth.

N. B. JOPSON, M.A.,
Reader in Comparative Slavonic Philology, King's College, London.

C. W. KIMMINS, M.A., D.Sc.,
Lots Chief Inspector, Education Dept.. L.C.C. (1904-23).

JOHN A. PEART, M.A.,
Director of Education, City of Winchester.
EMILY PHIPPS. B.A., BARRISTBR-AT-LAW,
Late Headmistress, Municipal Secondary Girls' School, Swansea. Late Editor of "The Woman Teacher."

W. RAMSDEN²³, D.M.,
Fellow of Pembroke College, Oxford. Emeritus Professor of Bio-Chemistry, University of Liverpool.

NOWELL SMITH, M.A.,
Formerly Headmaster of Sherbone.

G. A. SUTHERLAND, M.A.,
Principal of Dalton Hall, University of Manchester.

J. R. R. TOLKIEN, M.A.,
Rawlinson and Bosworth Professor of Anglo-Saxon, University of Oxford.
April 1933.

21) Humphrey Carpenter; Christopher Tolkien, J.R.R. Tolkien. La realtà in trasparenza, Bompiani, n. 180.

22) AA.VV., Esperanto in the Educational World, in «International Language», London, vol. VIII, May 1931, p. 87.

23) Walter Ramsden D.M. Doktoro pri medicino (1868-1947), ni trovas mencion pri li en letero de Tolkien al la filo Christopher de la 31a de majo 1944, en kiu li rakontas al la filo esti vespermanĝinta la antaŭan jaŭdon (25a de majo) kun «tri maljunaj sinjoroj kiuj estis tre afablaj»: H. L. Drake, Walter Ramsden kaj L. E. Salt, de Pembroke College kie Tolkien havis stipendion por profesoroj [Humphrey Carpenter; Christopher Tolkien, J.R.R. Tolkien. La realtà in trasparenza, Bompiani, n. 72].

INFORM@DIKO

Ĉu interreto helpas al Esperanto en merkata mondo?

Daniele Binaghi

Antaŭ 30 jaroj, en la proksimalproksima Hungario, naskiĝis firmao, kiu poste multe influadis la esperantistan movadon en tiu lando kaj en la aliaj. Ĝia nomo estis (kaj estas) Lingvo-Studio, kaj la fondinto estis László Szilvási.

Tiu malgranda firmao baldaŭ fariĝis la kerno de la Budapeŝta Esperanto-Centro "Eventoj", kaj dum ĝia vivo funkciis kiel Esperanta sonstudio, eldonejo, redakcio, kaj organizis IJS-n, unu el niaj plej famaj someraj samideanaj renkontiĝoj.

En tempo, kiam interreto estis io tute malsama ol tio, kio ĝi estas nun, Lingvo-Studio kapablis eldoni, dum la 10 jaroj inter 1992 kaj 2002, dusemajnan novaĵgazeton "Eventoj", certe la plej ofta Esperanto-informilo. Por pli rapide atingi ĝiajn abonantojn, en pli ol 65 landoj, oni organizis sistemon kun regionaj represajtoj: la budapeŝta preseja originalo estis sendita per rapida poŝto al Pollando, Rusio kaj Litovio, kie oni presis kaj distribuis ĝin al enlandaj abonantoj - kun aldonado de sia enlanda informilo. Poste, interreto ekfloris. Kaj ĉio ŝanĝiĝis...

Kiel rakontas László, "pro la alveninta revolucio en la komunikada teknologio en 2002 ni

fermis la paperan gazeton Eventoj, kaj komencis okupiĝi pri alia temo, nome pri instruado de Esperanto. Ni elformis profesion lingvolernejon, kie 3 lernoĉambroj kun plena ekipo priservas nur Esperantajn celojn. Laŭ kontrakto laboras ĉe ni 4-6 instruistoj. En la tradiciaj, klasĉambraj kursoj lernis ĉe ni pli ol 3000 homoj. Oni kredas", li aldonas, "ke ĝi estas la plej granda tia institucio en Esperantujo". Por tion atingi, kaj pro tiutempa manko en la merkato de taŭgaj profesinivelaj materialoj, Lingvo-Studio komencis ellabori proprajn, novajn instruilojn, kiel la pakaĵon "Sukcese ĝis la E-ekzameno..." , kiu laŭdire estas la

plej ampleksa lernilo-kompleto en Esperantujo, konsistanta el pli ol 10 integraj eroj; tiom bonkvallita ke la ĉefajn elementojn de la instrupakaĵo uzas kelkaj dekoj de aldonaj instruistoj kaj kursgvidantoj dis en la tuta hungara lando. Kaj, finfine, la lasta ŝtupo: la firmao kreis sian propran, unikan, pagan interretan kurson por hungaroj, konstruita de nulo ĝis B2 (= meza nivelo). Esperanto fariĝis merkata varo; ŝajne, sukcesa. Certe, oni devas danki iom al la fakto ke, por ricevi sian diplomon en Hungario, studentoj devas havi ankaŭ ekzamenon pri iu lingvo, kaj ĝi ofte povas esti ankaŭ Esperanto, do kompreneble temas pri interesita "publi-



La iama teamo de Eventoj, kun Szilvási malantaŭe, flanke de Ivo Lapenna

Nyelvgyakorló program az esperantó tanuláshoz - demo verzió - 2

Feladatlap kiválasztása:

1. lecke

1. lecke - 1. gyakorlat, végződések, 54 kérdés

1. lecke - 2. gyakorlat, végződések, 14 kérdés

1. lecke - 3. gyakorlat, nyelvtani elemek, 34 kérdés

1. lecke - Szavak kikérdezése - 56 kérdés

1. lecke - Tudáspróba, ellenőrző teszt - 15 kérdés

2. lecke

2. lecke - 1. gyakorlat, nyelvi elemek, 18 kérdés

www.esperanto.hu

Kilépés

A programról Hogyan tovább? Az esperantóról



La lernilo "Sukcese ĝis la E-ekzameno..."

ko"; sed tio ne sufiĉas: oni bezonas kompreni ke Esperanto povas esti ankaŭ "varo, por kiu validas la samaj merkataj leĝoj kiel por ĉiu alia varo".

László de 1987/88 estas profesia esperantisto; por li, lia laboro egalas al lia hobbio kaj, se li volas manĝi, la tutan tagon li devas okupiĝi pri Esperanto, kiu vivtenas lin. Ne estas facila tasko: kiel li diras, "funkciigi kaj sukcese gvidi iun Esperantan entreprenon postulas la saman laboron, sciojn kaj penon kiel neesperantistan entreprenon; kaj la Esperanto-movado mem estas tro malgranda por bazi ĝin nur sur profitdona principo: same kiel aliaj civilaj movadoj, ankaŭ esperantistoj devas baziĝi sur volontula agado". Tamen eblas, kaj li estas vivanta ekzemplo de tio. Komprenoble, tio ne signifas ŝanĝi la sintenon de ordinaraj esperantistoj, kiuj kutime aperas kiel pli idealismaj; sed ilia "entuziasmo tamen ne signifas rifuzon de profesinivela agado", kie oni pli bone havu "merkatekan vidmanieron". "Interreto mem estas tre efika helpilo por esperantistoj, sed pro la nova

metodo de komunikado ŝanĝiĝis ankaŭ la rolo de Esperanto-organizaĵoj; antaŭe la Esperanto-organizaĵoj – kaj membreco en ili – estis bezonataj por havi informon pri la aktualaj uzebloj de Esperanto: kie kaj kiam okazas Esperanto-aranĝoj, informoj pri novaj libroj, gazetoj, muzikoj ktp. Nuntempe ĉiujn tiujn informojn oni povas atingi SEN membreco en ajna formala societo. Do leviĝas la demando: kial membriĝi en Esperanto-societoj kaj asocioj? Ĉu oni entute bezonas Esperanto-asociojn, kaj se jes, kio estas ilia celo?" Bona demando, verdire; kaj mi jam renkontis timon pri ebla respondo, kiam mi sugestis ke oni povus enretigi tiun ĉi revuon, kaj IEF respondis ke, se la revuo estos legebla en interreto, oni dubas ke homoj aniĝus al IEF, kvazaŭ la membriĝo en sia nacia asocio estus nur por ricevi pape-ran informilon... malnovaj pensoj en moderna mondo, kie multaj jam legas sian ĵurnalon per tabulkomputilo! "Sed la problemo estas tie, kaj por respondi tion oni devas rigardi la tutan movadon kiel kompleksan siste-

mon, kvazaŭ manĝero sian entreprenon. Jam en 2008 la gazeto "La Merkato-96" de IKEF demandis en sia artikolo: "Ĉu asocioj bezonas membrojn?" - kaj Lu Wunsch-Rolshoven verkis artikolon en Berlina Informilo en 2005 pri la ebla neceso apartigi la por- kaj per-esperantaj organizaĵojn – laborantaj por disvastigi la lingvon resp. por preservi la jamajn parolantojn. Tre trafa estas lia analoga ekzemplo pri aŭtomobiloj: post la unuaj kelkaj jaroj plene apartiĝis la produktanta-organiza flanko (fabrikoj) kaj la uzantoj de aŭtomobiloj. Iliaj celoj estas malsamaj, sed ili ne povas ekzisti unu sen la alia... Tute same, kiel esperantistoj. Anstataŭ la ĝisnunaj "amasaj" Esperanto-asocioj mi antaŭvidas ilian transformiĝon al malgrandaj sed aktivaj societoj, kiuj membrigos nur tiujn aktivulojn, kiuj partoprenas en la organizado, funkciigado de la Esperanto-movado – kaj la aliajn Esperanto-parolantojn helpas per diversaj servoj, kaj priservas ilin kiel klientojn aŭ partnerojn. Anstataŭ plenrajtaj (kaj voĉdondevaj) membroj, oni povus ligi la individuojn al lokaj aŭ internaciaj asocioj per 'subtena membreco', aŭ 'amika societo' aŭ per similaj formacioj, kiuj donas la pozitivan senton aparteni al iu nobla celo kaj komunumo, kaj samtempe tio donas la eblon por priservado (--> kaj ankaŭ por peti financan kontribuadon)". Kaj kio pri la kursoj mem, László? La kvanto da kursoj por lerni Esperanto-n en interreto nuntempe abundas, tamen la nombro de homoj, kiuj aktivas en esperantujo, malgrandiĝas pli kaj pli: klubanoj maljuniĝas, kluboj malaperas, kaj ĝi ŝajne estas ne nur loka problemo. Kio

Federazione Esperantista Italiana



catalogo libri

gennaio 2014

Federazione Esperantista Italiana

Via E. Villorosi, 38 – 20143 Milano

Tel 02 58100857

fax 02 36740711

feilibri@esperanto.it

Federazione Esperantista Italiana

LIBROSERVO

Modalità d'acquisto

- I libri presentati in questo catalogo sono normalmente disponibili con tempi di fornitura contenuti. I libri non a catalogo dovranno essere ordinati e pertanto richiederanno tempi di fornitura più lunghi.
- Le ordinazioni devono essere indirizzate alla **Federazione Esperantista Italiana via Villorosi, 38 - 20143 Milano** avendo cura di indicare sempre i titoli completi dei libri richiesti. Le ordinazioni possono essere effettuate anche a mezzo telefono (02-58100857) o per posta elettronica indirizzando a: *feilibri@esperanto.it*
- La spedizione del materiale avviene normalmente in contrassegno (€ 12,00). Per i clienti già registrati i costi (fino a 2 kg.) sono: - spedizione normale € 2,50 – spedizione raccomandata € 4,50 (consigliata in quanto il materiale è spedito a rischio di chi ordina).
- Per le opere contrassegnate da (*), prima del titolo, verrà praticato lo sconto del 33% a chi ordina almeno 3 esemplari dello stesso titolo.
- I prezzi indicati sul catalogo possono essere aggiornati per eventuali variazioni dei costi all'origine.
- Eventuali accrediti devono essere effettuati sul conto:
- ccp FEI libri, cod. IBAN:
IT46 H030 6909 0000 0009 328
Cod BIC (indispensabile per pagamenti dall'estero): **BPPIITRRXXX**.

(*) = sconto del 33%

Sommario

1 – Grammatiche	p. 3
2 - Letture didattiche	p. 6
3 - Vocabolari	p. 8
4 - Storia del movimento	p. 10
5 - Saggistica	p. 13
6 - Poesia originale	p. 17
7 - Poesia tradotta	p. 18
8 - Prosa originale	p. 19
9 - Prosa tradotta	p. 24
10 - Religione	p. 30
11 - Politica	p. 30
12 - Fumetti e libri per ragazzi	p. 32
13 - Teatro	p. 34
14 - Geografia e Turismo	p. 36
15 - Cucina	p. 37
16 - Quaderni U.E.A.	p. 37
17 - Musica	p. 38
18 - Varie	p. 39

1 - GRAMMATICHE

Ĉu vi aŭdas, ke...? K. Smidéliusz
Grammatica per migliorare il proprio livello
linguistico con l'aiuto di un CD.
ISBN 963-550-138-2
E-duKati, Hago 2007
20 cm., 64 p. € **15,00**

Detala Gramatiko de Esperanto B. Wennergren
Una nuova grammatica, più snella e
semplice, dello stesso autore de "Plena
manlibro de esperanta gramatiko".
ISBN 978-80-89366-09-5
E@I, ILEI 2010
21 cm., 218 p. € **12,50**

*Esenca lernolibro de la itala lingvo



M. Mezzadri
Grammatica in Espe-
ranto per lo studio
dell'italiano. Con
testi di
autovalutazione.
ISBN 88-7715-917-0
Guerra Edizioni,
Perugia 2006
18 cm., 256 p.
€ **8,50**

Esperanto de nivelo al nivelo

AA.VV.
Materiale didattico per prepararsi agli esami
secondo il quadro Comunitario Europeo.
ISBN 978-963-284-040-6
Budapest 2008
24 cm., 136 p. € **12,00**
con CD € **15,00**

Esperanto estas facila R. Corsetti
Facile libretto dove i principianti possono
apprendere tanti vocaboli in ordine
alfabetico.
Stampato in proprio, 2011

21 cm., 144 p. € **5,00**

*Esperanto: grammatica

Manuale sintetico in 12 lezioni.
Istituto Italiano di Esperanto (IIE), Verona
21 cm., 144 p. € **6,20**
esaurito

*Esperanto – Manuale della lingua internazionale

Zlatko Tisljar
Corso elementare strutturato secondo il
metodo diretto.
ISBN 88-85872-03-4
Co.Ed.Es. 1990, Milano - 2° ed.
21 cm., 82 p. € **7,50**

Esperanto per rekta metodo

S. Marček
Grammatica di 22 lezioni riccamente
illustrata. Completamente in esperanto.
ISBN 80-969581-8-6
Eld. S. Marček, Martin 2006
25 cm., 110 p. € **10,00**

Esperanto rapide

N. Rossi
Corso per scuole medie superiori.
N.E.A., Napoli 2000
30 cm., 94 p. € **15,50**

*Jen nia mondo

J. Wells
Grammatica per corsi radiofonici con cassetta
audio dei dialoghi.
ISBN 88-7036-049-0 - Edistudio, Pisa 1992
21 cm., 60 p. + 1 cassetta C60 € **12,40**



*Kunvojaĝu

P. Gubbins
Grammatica con metodo
diretto; rilegata e
illustrata.
ISBN 88-7036-050-4
Edistudio, Pisa 1994
21 cm., 240 p.
€ **15,50**

+++++

***L'Esperanto con il metodo diretto**

S. Marček / trad. L. Oberrauch
Una grammatica di 22 lezioni riccamente illustrata. Spiegazioni della grammatica in italiano e vocabolario allegato.
ISBN 978-80-96967-1-4
F.E.I., Milano 2007
25 cm., 114 p.



€ 11,00

La grammatica è completata dal seguente materiale didattico:

Instruaj Bildoj por Rektmetoda Instruado

500 illustrazioni su schede cartonate da utilizzare nei corsi con il metodo diretto. 2 cofanetti (volumi I e II, 250 schede cad.) 19 x 14 cm.

€ 57,00

Instruaj bildoj por rektmetoda instruado

CD con 500 illustrazioni in formato PDF, da proiettare o da stampare.

€ 15,00

Elprinteblaj tekstoj de la libro Esperanto per rekta metodo

CD con illustrazioni e testi in esperanto del corso, in formato PDF, da stampare e da proiettare.

€ 15,00

Esperanto per rekta metodo. Modela elparolo: tekstoj en esperanto de la lernolibro en MP3-formato

CD con i testi del manuale in esperanto letti ad alta voce, da ascoltare tramite computer o I-Pod.

€ 15,00

+++++

Manlibro pri instruado de esperanto

Red. K. Kovàts
Una grammatica per perfezionare il livello di conoscenza della lingua. 2a edizione.
ISBN 80-969042-6-4
ILEI - ESPERANTO@INTERRETO, 2005
20 cm., 150 p.

€ 11,00

***Manuale di esperanto**

B. Migliorini
Corso a struttura grammaticale classica in 12 lezioni; con prefazione di T. De Mauro.
ISBN 88-85872-04-02
Co.Ed.Es., Milano 1996
21 cm., 160 p.

€ 9,50

Manuale di Esperanto

A. Iannacone
Corso di 25 lezioni, con una lista di falsi amici, una piccola antologia di testi e un piccolo vocabolario nelle due lingue.
ISBN 978-88-88030-82-1
Edizioni EVA, Venafro 2011
21 cm., 168 p.

€ 15,00

***Manuale di esperanto - II livello**

N. Vessella – R. Corsetti
Testo per l'approfondimento della lingua strutturato secondo il metodo diretto.
ISBN 88-85872-11-5
Co.Ed.Es., Milano 1999
21cm., 320 p.

€ 12,40

Ne tiel, sed tiel çi!

F. Faulhaber
Strumento classico per usare uno stile elegante in esperanto.
S.A.T., Beauville 2002
20 cm., 64 p.

€ 4,00

***Nuovo corso di esperanto**

U. Broccatelli
Corso in 11 lezioni, ampiamente corredato di esercizi, secondo il metodo grammaticale.
ISBN 88-85872-06-9 **esaurito**
HdE/Co.Ed.Es., Milano 1995 2° ed.
22 cm., 192 p.

€ 12,40

Parlo esperanto D. Astori
Manuale di conversazione in esperanto
della famosa collana Vallardi, "in tutte le
lingue del mondo".
ISBN 88-11-94408-2
Ed. Vallardi, Milano 1996
16 cm., 202 p. € **7,00**

Plena manlibro de Esperanta Gramatiko B. Wennergren
Nuova grammatica per approfondire la
formazione delle parole, scrittura e
pronuncia.
ISBN 0-939785-07-2
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko,
California 2005.
23 cm., 696 p. € **33,00**

Saluton! A. Childs-Mee
Libro di studio diretto per autodidatti, ma
anche per corsi, con chiavi per gli esercizi.
ISBN 92-9017-050-6
U.E.A., Rotterdam 2002 (7° ediz.)
21 cm., 194 + 40 p. € **12,00**

